

Laŭokaza novaĵletero

de la komerca fakgrupo.

Numero 2;

oktobro, 1984.

*Respondeculo: S-ro Lorenc' Mi,
P.O. Kesto 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederlando.*

Pensoj pri la neceso por Esperantista komerca fakgrupo,

de Franz Josef Braun.

Esti Esperantisto signifas esti ĉiam en deĵoro, arde ligita al la tasko plivastigi la akcepton de nia lingvo. Ni estas konvinkitaj, ke la vivoverko de L.L. Zamenhof estas grandioza kaj elstara afero utila al la homaro, afero kiu ege meritas disvastigadon. Sed ni ĉiuj ankaŭ spertas, kiel ni ĉiutage devas batali kontraŭ obstinaj rezistoj, aparte kontraŭ la antaŭ-juĝoj de la kleruloj, kiuj insiste asertas, ke kiel internacia lingvo povas funkcii nur nacia, natura lingvo; ke artefarita lingvo neniel taŭgas por la tasko.

Kiel tio rilatas al la temo?

Malmultajn monatojn post kiam mi Esperantistiĝis, impresis min la varieco, en kiu estas dispartigita la Esperantistaro, 'fake' kaj 'loke'. En la UEA-Jarlibro por 1984, sur paĝoj 46 - 67, oni povas ekvidi tiujn fakojn, ekde Agrikulturo, tra Filologio kaj Muziko, ĝis Veteranoj, ordigeblaj laŭ profesiaj, ekleziaj, filozofiaj, libertempaj kaj aliaj temoj. Sed komercisto, kiel mi, vane rĉas fakgrupon, kiu rilatas al la 'profesia hobia'.

Ĉu absolute ne ekzistas komercaj-ekonomiaj-ekonomikaj-Esperantistoj, mi demandis al mi mem.

Ĉu ili estas tiel kaptitaj en sia profesio, ke ili ne disponas pri tempo ekzerci la internacian lingvon?

Aŭ ĉu ili eĉ ne kuraĝas ekzerci ĝin, konsidere al la supereco de la angla lingvo sur tiu kampo? Mi ne volis agnoski la pravecon de miaj tiam-ne-forigeblaj duboj.

Ĝojigaj estas nun la multnombraj reagoj al la cirkulero de la 6-a de julio, 1934, de Lawrence

Mee kaj mi, reagoj kiuj reŭtatas la dubojn. Ho, jes! vere ekzistas komercaj-ekonomikaj-Esperantistoj pretaj al kunlaborado!

Kelkfoje ni demandas kaj certe ankoraŭ demandos nin, ĉu entute havas sencon disipi nian raran tempon por tia fakgrupo, konsiderante la grandan antaŭecon de la angla lingvo en la internacia-komerca kampo? Tamen, nei ĉi tiun demandon signifus, ke ni tuj ĉesu labori por Esperanto. Ĉar tio pruvus, ke nis lingvo ne, efektive taŭgas en la komerca-ekonomi(k)a branĉo, kaj do ne al ĉiuj lingvaj bezonoj kaj taskaroj.

Sed per kiaj agoj niaj ni montru alla publiko, ke, kaj kiamaniere, Esperanto ankaŭ en la komerco funkcias? Ni estas ja nur malmulte da manoj! Tiom pli gravas, ke ni ekonomie mastruru nian tempon favore al tiaj aktivecoj, kiuj promesas la plej altan efikon, tio estas, la plej grandan atenton kaj la plej nombran alparolon al homoj decidaj kaj influhavaj por nia afero.

En nia cirkulero prialudita, Lawrence Mee kaj mi prezentis

paĝo du

kelkajn agadpunktojn. Ni emfazas, ke tiu listo ne estas kompleta; vi, karaj gelegantoj, estas invititaj nomi pliajn agadcelojn. Por efike labori necesas ankaŭ, ke ĉiu kunlaboranto okupu sin pri tia agadpunkto, en kiu ŝili havas propran talenton, kaj apartajn kapablojn kaj spertojn. Supozeble, kelkaj el la agadpunktoj estas preterpase efektivegeblaj por ĉiuj.

Jen kelkaj pensoj pri unuopaj aktivecoj, per kiuj ni montru al la publiko la taŭgecon de nia lingvo ankaŭ sur la komerc-ekonomi(k)a kampo:

Vortaro estas la bazo de lingva laboro. Elstara laboro en tiu sfero faris la antaŭuloj de nia fakgrupo, nome la membroj de la Instituto por Esperanto en Komerc kaj Industrio, (ĜKI), kiuj kreis la verkon, Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj. La kunmetsistemo de tiu vortaro estas vere modela. Necesas nun nur kompletigi ĝin per pliaj fakterminoj ankoraŭ ne Esperantigitaj. Tiam, ni povos traduki en Eo-n eĉ la plej malfacilan kaj speciale nacilingvan ekonomikan tekston. Tio ankaŭ utilis ĉe aŭtomata tradukado, kaj kontribuis al la ebleco, ke Eo estu pontlingvo ĉe internacia multlingva tradukado. Temas pri laboro, kiu necesigus Zamenhofan senton pri ĝusta vortfarado. Do, vortokreantoj, al ni anoncu vin!

Ni povus ankaŭ prezenti al la Esperantistaro tradukojn de raportoj pri ekonomiaj kaj ĝenerale interesaj aferoj, ekzemple pri la ekonomia stato de iu lando, komunumo, kontinento, grava institucio aŭ simile.

Kiel oficisto de granda, mondkonata kompanio oni povus doni surprizon al la direkcio per traduko en Esperanton de ĝiaj jarfinaj raporto kaj bilanco.

Ege gravas, mia opinie, ke Esperantistaj komercistoj serĉu kontaktojn kun aliaj tiaj, kaj en tiuj kazoj, kiam ili inter si vendas varojn, ili ambaŭ plenumu la tutan skribadon en la internacia lingvo. Per tio, ankaŭ doganistoj, bankistoj kaj trafikentreprenistoj kaj aliaj vicle-nevole kontaktigu kun

Esperanto.

Facile oni povas, individue, skribi leteron al entrepreno, kiam ekvidiĝas perspektivoj aŭ pakajoj, aŭ instrukciaro plurlingve presita, proponante, ke tiu estonte aldonu Esperanton kiel plian lingvon.

Aparte konsiderinda estas la aktiveco de studentoj de la ekonomika fakultato, ke ili uzu la internacian lingvon ĉe sia scienca laboro en la universitato, kaj per tiu agado atentigu kolegojn-kunstudantojn pri Esperanto.

Mi alproksimiĝas al la fina mia artikolo. Ĉi tie ankoraŭ estas nepre necese averti: averti kontraŭ iluzioj. La celo de nia laboro ne povas konsisti el atakoj al aŭ eĉ preterpaso de la angla lingvo en la kampo de komerc. Tia pretendo estus ridinda kaj fiaskiga agadpolitiko. La nivelo de nia ekspekto devas esti multe pli modesta. Plej grave ĉe nia agado estus, ke ni senĉese uzu, pluportu kaj pluevoluigu Esperanton kaj ĝian terminaron ankaŭ en la komerca-ekonomika sfero, de jardeko al jardeko. Per tio, ni ne-ŝanceleble kaj persiste demonstrus al niaj samtempuloj, kolegoj kaj komercamikoj la taŭgecon de la internacia lingvo, Esperanto, ankaŭ en nia kampo.

La homaro konsistas ne simple el angleparolantoj, kiel ofte oni intencas kredigi nin en la 'okcidento'. Povus iutage ekesti apartaj eventoj en la mondo, povus ŝanĝiĝi la tendeco en ĝenerala lingvouzmodo, kiuj kune aŭ aparte estigus la intereson je Esperanto. Por tiu tago ni nin pretigu! Kaj por tiu tago ni celigu nian nuntempan laboron por la komerca fakgrupo!

En tiu ĉi senco ni estus respektata parto de la tuta Esperantistaro, kaj unu el la pluraj fakgrupoj, kiuj, ĉiuj je sia loko, agas solidare por la plivastigo de Esperanto: la fervojistoj, la matematikistoj, la komercistoj kaj la aliaj; laŭ la moto:

Disiginte marŝi,
unuiginte batali!

INTERKONATIĜO.

Reagoj, aŭ al nia cirkulero, aŭ al la reklamannoncetoj en MONATO kaj El Popola Ĉinio, ankoraŭ venas al nia poŝtkesto, kaj tiuj, kune kun reagoj al la unua Novaĵletero, minacas drovi nin en laboro. Bonege!

Neniu persono aŭ instanco plu rajtas dubi, ke malkovrigis inter la Esperantistoj multaj personoj, kiuj ŝajne sopiris dumlonge metodon ut- iligi la lingvon pere de aktivecoj en la kampo de komercaj rilatoj kaj ekonomiaj studoj.

Tiu ĉi Novaĵletero iras al, krom ĉiuj jam nomitaj, la sekvantaj 23 personoj en 16 landoj. Ĉi-foje, tamen, ni ne provas aldoni adres- ojn; se iu leganto volas starigi kontakton kun persono en la listo, tiu bonvolu peti la adreson de ni, aldante, tamen, du respondkuponojn por la servo.

Brazilo:	Albuquerque, S-ro R.C., Coelho, S-ro L.A. de O., Santana Ferreira, S-ro H.I.,	Rio de Janiero; P. do Sul; Itabuna;
Ĉinio:	Lu, S-ro Gao-di,	Si-an;
Danlando:	Hagemann, S-ro Per,	Kopenhavn;
Ekvadoro:	Wuest, S-ro J.J.,	Riobamba;
Francio:	Gilbert, S-ro F.K., Texier, S-ro J.L.,	Bar-le-Duc; Paris;
Okc. Germanio:	Bormann, D-ro W., Schneider, S-ro F.,	Hamburg; Olpe;
Hispanio:	Instituto Deks, S.A.,	Sevilla;
Hungario:	Bebeŝi, S-ro J., Gether, D-ro I.,	Budapest; Budapest;
Israelo:	Šemer, S-ro J.,	Tel-Aviv;
Italio:	Corvi, D-ro V., Sartorio, S-ro G.,	La Spezia; Genova;
Jugoslavio:	Ĝurić, S-ro J., Neŝić, S-ro J.,	Beogrād; Niš;
Kolombio:	Ortegón, S-ro M.J.,	Bogotá;
Nederlando:	Rapley, S-ro J.C.,	Rotterdam;
Nov-Zelando:	Hill, S-ro N.,	Wellington;
Pollando:	Bolesław, S-ro J.,	Pszczyna;
Venezuela:	Schenkel, S-ro Ivo,	San Felipe.

Al ĉiuj tiuj reagantoj ni esprimas dankon pro la intereso, kaj ant- icipe dankas pro daŭra kaj laŭebleca aktiva subtenado.

Administrado kaj financoj.

La provizora administrado restas pli-malpli adekvata al la ĝisnunaj taskoj, kvankam la kunmeto de tiu ĉi Novaĵletero lamas du semajnojn post la pripensita dato. Raportoj inter la Sekretario kaj Prezidanto okazas perletere, kaj esperoj efektiviĝi personan renkontigon restas esperoj. Neniu sinpropono aliĝi al la Estraro venis ĝis nun, sed financa subtenado estas jam tre kuraĝiga.

Reage al nia peto por serioza konsiderado pri taŭga nomo por nia asocio, tri-foje venis opiniesprimo, ke la formo, Komerca Fakgrupo, estas adekvata, sed leviĝis ankaŭ du proponoj de pli longa formo.

Unu propono estas: Esperant(ist)a Fakgrupo Internacia pri Komercio kaj Ekonomio, el kiu nature venus la interesokaptiga siglo: EFIKE.

La dua propono estas: Internacia Fakgrupo pri Komercaj Rilatoj kaj Ekonomio per Esperanto, kun malpli interesa siglo: IFKREE.

Ni petas vin ĉiujn, indiku al ni vian preferon el inter la tri.

El la vidpunkto de financoj, la Fakgrupo faris jam kontentigajn paŝojn. Naŭ membroj pagis la (duonigitan) kotizon por la kuranta jaro, kaj tri membroj pagis jam la kotizon por la proksima jaro. Ses membroj kontribuis al la asocia kapitalo, kaj malavara donaco venis por la ĝenerala kaso. Unu membro faris donacon en la formo de libroj per kiuj starigi bibliotekon por la fakgrupo. Membro en lando kun deviztranspagaj problemoj proponis pagon en la formo de varoj. El la kontotenado, ni faris provizorajn Spezokonton kaj Bilancon, kaj ilin publikigas nun por ĝenerala intereso. Ni emfazu la provizorecon!

En la proksima Novaĵletero, antaŭvidita por la lasta semajno de la jaro, ni publikigos memroliston. Tiu ĉi nuna Novaĵletero iras al ĉiuj nomoj jam menciitaj, kaj ni petas, ke tiuj inter vi, kiuj intencas membriĝi per transpago de mono, aŭ deziras membriĝi per transpago de valoro en alia formo, tiun pagon faru aŭ tiun deziron anoncu baldaŭ, por certigi, ke ni retenos vian nomon en nia listo. Konsiloj pri kiel fari pagon aperas jam en la unua Novaĵletero.

Provizora Spezokonto, je 1984-10-01, en guldenoj.

Kostoj		Rimedo	
Ĝeneralaj kostoj	45	Membrokotizoj	90
Materialoj	⊕ 11	Donacoj	98
Novaĵleteroj	⊕ 52		
Afranko ĝenerale, nete	⊕ --- 41	Ne-uzitaj rimedoj	-- (39)
sume	=== 149	sume	=== 149 gld.

Provizora Bilanco, je 1984-10-01, en guldenoj.

Aktivoj		Pasivoj	
Starigaj kostoj	260	Membrokotizoj	
minus deskribo	--- 45	antaŭpagitaj	60
Biblioteko	15	Kreditoro: M.E.E.	70
		Asocia kapitalo	61
		gajno provizora	--- 39
sume	=== 230	sume	=== 230 gld.

subskribita de:

⊕ baldaŭ okazos
kromaj elspezoj

Lawrence Mee,
Aganta Kasisto.

Interŝanĝo de ideoj.

Ni volas doni kvazaŭ unuarangen gravecon al tre lastatempa sciigo de reaganto al nia cirkulero.

S-ro Gilbert, kiu loĝas en nord-orienta Francio kaj kiu cetere estas direktoro de la komerca ĉambro por la franca regiono, Meuse, (meŭz), proponas la uzadon de Esperanto en baldaŭ-starigota grandpotenca komisiono. Fone al la propono estas la konata sistemo en la Eŭropa Ekonomia Komunumo, (EEK), atribui komunumajn kreditojn celatajn helpi apartajn regionojn en la diversaj landoj de la EEK. Lastatempe leviĝis propono, (far ne-Esperantistoj), krei novan komisionon rajtigotan elspezi tiajn kreditojn por aparta regiono, ne de unu lando sed de pluraj.

La koncerna regiono estas la baseno de la rivero Meŭz, kiu komenciĝas en Francio, kaj trakuras Belgio-n kaj Germanio-n por atingi la maron ĉe Nederlando. Tia komisiono, pensas S-ro Gilbert, certe profitus el uzado de la internacia lingvo, kaj ne dubas, ke en tio li havas la spiritan subtenon de ĉiuj niaj membroj.

Nenio okazis lastatempe pri nia agadpunkto, arangi re-eldonadon de la IKEV, krom en tio, ke ni eksciis, ke tradukado de ĝi en la lingvojn de la orienteŭropaj landoj jam komenciĝis, kaj traduko en almenaŭ la hungaran estas jam preta. Krome, tamen, ni ricevis konsilojn de S-ro Vogelmann pri la afero, kaj ni devas konstati, ke arangi la re-eldonadon estos malsimpla taskaro. Eble la plej grava bezono restas ankoraŭ la kapitalo por entrepreni la re-eldonadon, sed krome ni devas pripensi plurajn laŭjurajn rajtojn kiuj ankoraŭ ekzistas rilate tiun apartan verkon.

Jam ni ricevis, ĉefe el Irano, proponojn, ke nia Fakgrupo tre serioze pripensu la eblecon entrepreni la eldonadon de studlibroj fakaj. La celo estas ebligi studadon de ekonomiko kaj rilataj temoj, en la i.l., je universitata nivelo. Krome, tamen, oni proponis la kunmeton de gvidlibro pri

mondnivela verkado kaj korespondado. Valoras mencii, tiurilate, la rekomendindan libron, la Manlibro pri Ĵurnalismo, sed tamen ni devas agnoski, ke leviĝas apartaj bezonoj je uzado de la i.l. dum korespondado kaj raportado.

Bezonos tempon, kompreneble, studi eblecojn kaj atingi komunan sintenon pri tiu ĉi tuta temo de eldonado de fakaj libroj, sed jam estas konvene ekstarigi diskuton pri ĝi. Ĉu ni havas membron, kiu pretas akceptila taskon kunordigi tiajn proponojn kaj agadojn? Ĉu taŭga alirvojo estus akumuli antaŭpagitajn mendojn por specifaj libroj, inter kiuj kompreneble la nova IKEV? Nepre sciigu nin pri viaj pensoj kaj proponoj!

Ni ricevis tri librojn, pli-malpli fakajn, el Hungario, donacitajn de D-ro Gether. Ni devis responde respondi, ĉu la donacinto celis la aperigon de recenzoj de la libroj, kaj al tiu demando ni atendas respondon. Versajne, tamen, ni pretas agi kiel peranto por mendoj de tiuj kaj aliaj libroj, ne de ni eldonitaj.

El Irano, kiu estas lando kun deviztranspagaj problemoj, ni ricevis tre seriozan peton agi kiel peranto por libro kiu ne estas faka en nia kampo. Temas pri la represo de la verko, La Nobla Korano. Se iu membro celas akiri tiun libron, tiu membro povas fari al nia kaso pagon en la sumo de kvindek guldenoj, kaj ni plu aranĝus la aferon. Tio estus valora helpo al tre aktiva grupo de samideanoj kaj samidealanoj en lando, kiu travivas malfacilaĵojn.

El Kameruno venis dua, tre serioza propono, pri metodoj en kiuj Esperantistoj povas ebligi al samideanoj en tre malriĉa lando ĝi plialtigon de vivnivelo kaj samtempe mem sperti neforgeseblan viziton al tre vizitinda lando. Temas pri turistaj eblecoj en okcidenta-mez-afrika lando. Ni pretas peri informpetojn.

paĝo ses

Kaj el Brazilo venis propono, ke ni peru abonojn al revuo, Fento. Ŝajne ni ne povos tute eviti enmiksiĝon en komerco!

Cetere, la propono, ke ni listigu nomojn de entreprenoj, kiuj uzas, aŭ pretas uzi, la i.l.-n por komercaj rilatoj, ricevis subtenadon, kvankamsen apartaj konkretaj proponoj pri kiel ĝin organizi.

Membronia, S-ro Rotsaert, estas unu el la respondeculoj por la okazonta 19-a Markola Kongreso. Tio estas aranĝita por la semajnfino, la 19-a - 21-a de aprilo, proksimjare, en la belga apudmara urbo Brugge, (bruĝ), kaj je ĝi verŝajne okazos la unua, (ne-formala!), renkontiĝo inter membroj de la Fakgrupo. Malmulte da lokoj restas mendeblaj; se ankaŭ vi deziras aliĝi, skribu, kiel eble plej baldaŭ, al la adreso je paĝo 102 de la Jarlibro de UEA.

Se persona komento estas tie ĉi permesata, mi devas diri, ke iom maltrankviligas min konstati, ke inter niaj reagantoj la plimulto asertas, ke ne eblas al ili sinproponi por aktiva laboro. Jam estas bone konate en Esperantujo ke tro ofte asocioj tro ŝargas unu personon per tro da laboro, kaj la ne-evitebla rezulto estas pli-malpli rapida fiaskiĝo de la klopodoj.

Necesas meti multajn ŝultrojn je la rado!

Pli da manoj malpezigas la laboron! Kaj tiel plu!

Kaj tiel plu!
(Legu la Proverbaron, se vi postulas pli da aforismoj!)

Al la mondo pli valoras niaj atingoj ol niaj aspiroj!

LM

Diversaĵoj.

Ĉar jam elĉerpiĝis la stoko de ekzempleroj de nia originala cirkulero, ni prenas nun okazon ĝin represi, por ke novaj informpetantoj povas facile legu kaj studu la fonajn pensojn malantaŭ la starigo de nia nuna Fakgrupo.

Ĉiuj el tiuj originalaj proponoj ankoraŭ validas; ĉiam valida estas nia instigo, ke vi sentu personan devon partopreni ĝis via tuta eblo en la valora laboro plivastigi la akcepton de la internacia lingvo en la kampoj de komercaj rilatoj kaj internaciaj ekonomiaj diskutoj. Dum tro longe mankis dediĉita laboro en tiu ĉi vasta kampo; la reagoj dum la tri-kaj-duono monatoj, kiuj foriris jam post nia unua alvoko, pravigas ĉiujn niajn esperojn.

Aparte nun ni volas adresi vortojn al tiuj valoraj samideanoj kiuj, pro aĝo, ne plu aktive laboras por la internacia lingvo. Kun via helpo, ni esperas fari

kontaktojn kun konatuloj viaj, kiuj jes disponas pri la energio, la tempokaj la mono kunlabori kun ni por antaŭenirigi la gravan aferon. Al vi aparte ni volas diri: Jenni provizas por vi varbfolion; ĝin utiligu por ni! Kaj ne hezitu peti kromajn ekzemplerojn, se necese!

Por tiuj, kiuj volas nun fari pagon al nia kaso, ni ripetas nian konsilon, prefere uzi aŭ internacian poŝtmandaton aŭ la poŝtĉekinstancojn. Vi adresu la pagon al:

Mondk. Eldonejo Esperantista,
P.O. Kesto 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederl.,

kun mesaĝo: por la fakgrupo. En la kazoj de rektaj pagoj, nia poŝtĉekkonto estas 361 47 95 je la nederlanda poŝtĉekinstanco.

La jarkotizo estas dudek guldenoj, sed pagoj je pli grandaj sumoj, por ebligi starigon de kapitalo, estas aparte bonvenaj.

Anticipajn elkorajn dankojn!

Provizora koresponda adreso:

Fakgrupo Komerca,
Postbus 25041,
3001 HA Rotterdam,
Nederlando.

Rotterdam, / Bühl,
Nederlando. / F.R. Germanio.

1984-07-06

represo: 1984-10-15

Estimata samideanino aŭ samideano,

Vi ricevas tiun ĉi cirkuleron ĉar via nomo troviĝas en la ĵuseldonita Jarlibro de UEA, kaj ĉar apud via nomo staras aludo al ia aferkampoj de komerco, ĉu pro fakdelegiteco aŭ pro priskribo de via profesio.

Ni, la subskribintoj de la cirkulero, sendas ĝin al vi kiel la unua paŝo cele al starigo de nova fakgrupo, pri Esperanto en komerco kaj ekonomio. Mallonge dirite: vi kaj ni regas la internacian lingvon kaj havas ĉiutagajn rilatojn kun komerco en iu formo, kaj ni ĉiuj, supozeble, volas, ke pli kaj pli da tiaj komercaj rilatoj estu faritaj surbaze de la internacia lingvo, Esperanto. Ni sentas, ke taŭga kunordigado de komunaj laboroj povus malfermi al ni pordojn, kiuj ĝis nun baras la vojon aŭ vojojn al pli ĝenerala akcepto de Esperanto en la kampo de komercaj rilatoj. Ni kredas, ke tia kunordigado de laborfortoj plej facile estas konstatebla per starigo de dediĉita fakorganizaĵo, kaj sekve ni invitas vian partoprenon.

La formo de la fakorganizaĵo estas ankoraŭ, kompreneble, ne findecidita. Ni du subskribintoj esperas, ke siatempe ĝi estu internacia grupo de samidean(in)oj, ligita kun UEA kiel kunlaboranta fakorganizaĵo kaj starigante jarkunvenojn en la kadro de Universalaj Kongresoj, sed ni ne intencas vere trudi tiujn esperojn al aliaj personoj, se niaj ideoj ne trovos ĝeneralan subtenon. Je la plej malalta nivelo, ni antaŭvidas regulan intersangadon de spertoj, ideoj kaj opinioj, aŭ per kontribuoj al jam konata ĵurnalo aŭ revuo, aŭ per propra bulteno.

Aliaj agadceloj jam diskutitaj estas :

1. labori por re-eldono de la konata Internacia Komerca-Ekonomika Vortaro en plivastigita formo rilate al la nombro de lingvoj, kaj pliampleksigita per novaj terminoj;
2. instigi eksportantajn entreprenojn al uzado de la internacia lingvo por instrukcioj kaj priskriboj sur pakajoj de varoj;
3. verki konstantan ekonomika-komercan rubrikon en iu revuo, aŭ eldoni bultenon pri la ekonomia situacio en apartaj landoj, komunumoj aŭ landogrupoj, aŭ en la tuta mondo;
4. instigi butikistojn kaj aliajn posedantojn de vendejoj, kaj ties komizojn, al lernado de Esperanto, (precipe en Kongresurboj), kaj instigi Esperantistojn preferi tiajn entreprenojn kiel eble plej ofte;
5. malfermi rilatojn kun Komercaj Ĉambroj, kaj por doni informojn pri la i.l., kaj por instigi subtenon de niaj laboroj;
6. traduki en Esperanton jarfinajn financajn raportojn de internaciaj entreprenoj, kaj por montri la tutan taŭgecon de la i.l. en tiu kampo, kaj cele al plivastigo de nia faka vortprovizo;

7. instigi al lokaj E.-grupoj teni kontojn kaj fari jarfinraportojn en Esperanto, kaj starigi taŭgajn kursojn pri komerco kaj ekonomio inter grupanoj, kaj tiel plu.

Ni, la subskribintoj, nun invitas vin montri vian intereson per respondo al tiu ĉi cirkulero. Se vi pretas anonci jam nun vian intencon aktive partopreni en la laboro, (kaj tio signifas, finance kontribui al la kostoj), vi donus apartan ĝojon al ni du. Se, tamen, vi pretas subteni niajn laborojn sed ne vidas eblecon vere aktive kunlabori, nepre tion anoncu, ĉar ni volas nombri vin inter la simpatiantoj. Se vi havas talenton verki fakajn artikolojn aŭ raportojn, aŭ havas facilajn alirojn al fontoj de statistikaj donitaĵoj pri la ekonomia evoluado de via lando, aŭ havas la eblecon uzi ekipaĵojn bezonatajn por eldoni (modestan) bultenon, aŭ en iu alia maniero havas apartan kvaliton valoran por la fakgrupo, nepre prenu la nunan okazon anonci tion al ni; ni certe laborigos vin!

Ni konstatas, ke tio ĉi ne estas la unua okazo en la historio de nia Movado, kiam komercistoj kunlaboradis cele al akceptigo de la internacia lingvo, sed ni estas optimismaj, ke ni ne vane klopodas starigi novan fakgrupon. Multe da laboro staras antaŭ ni, sed se sufiĉe da manoj entreprenas ĉiun sian parton, bonaj rezultoj estos realigeblaj. Ni bezonas vian subtenon kaj vian aktivan partoprenadon.

Anticipe, ni dankas pro via intereso, kaj restas,
kunlaboreme kaj sincere viaj,

Lawrence Mee,
Franz J. Braun.

postskriboj:

1. Ne pro simpla neglekto niaflanka vi ne trovos respondkuponon en la koverto, kaj pro tiu manko ni pardonpetas. Ni estas konsciaj, ke ĝentileco indikas ĉiam la aldonon de respondkuponon kiam respondo estas dezirata, kaj ke la reguloj de la Delegita Reto de UEA tion postulas, sed la kostoj forsendi tiun ĉi cirkuleron jam estas tiom grandaj, ke ni devis rezigni pri la kroma kosto. Ni esperas, ke vi afable komprenos nian sintenon, kaj pardonos nin ĉi-okaze. Apartan koran dankon!
2. Facile konstateble estas, ke vi, kies nomo troviĝas en la Jarlibro de UEA, jam multe okupiĝas pri la disvastigo de la internacia lingvo; se simple ne eblas al vi aldoni plian taskon aŭ oficon al tiuj, kiujn vi jam portas, ni pardonpetas pro tiu ĉi nia ĝeno al vi. Povas esti, tamen, ke konate al vi estas Esperantist(in)o kies nomo ne aperas en la Jarlibro, sed kiu tamen havas pangajnan rilaton kun komerco. En tia kazo, ni ĝentile petas vian afablecon transdoni al tiu persono tiun ĉi alvokon al kunlaboro. Koran dankon!

LM
FJB.

postpostskribo:

Tiu ĉi alvoko iras al 154 adresoj en 67 landoj. (Inter la tuto, 143 estas Delegitoj aŭ Fakdelegitoj.)